LA SANKTEGA TRIUNUO – 30an de majo 2010

ĈIO AJN KION LA PATRO HAVAS ESTAS MIA. LA SPIRITO RICEVOS EL MIAJ KAJ ANONCOS AL VI – Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Joh. 16, 12 -15

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj:

“Mi havas ankoraŭ multajn aferojn por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti.

Tamen kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron; ĉar li parolos ne de si mem; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos; kaj li anoncos al vi venontajn aferojn.

Li gloros min, ĉar li ricevos el miaj kaj anoncos al vi.
Ĉio ajn, kion la Patro havas, estas mia; tial mi diris, ke li ricevos el miaj kaj anoncos al vi.”

Nur kiu estas preta donaci sian vivon kiel Li, tiu povas kompreni la mesaĝon de Jesuo. Ni aŭskultu kion diras Jesuo en la Evangelio laŭ Sankta Johano.

“Multajn aferojn”, sed vere estas: ‘multon’, ”Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti”. Kial? Ili ankoraŭ ne scias kiun morton havos Jesuo kaj precipe ili ankoraŭ ne havas la Spiriton kiun Jesuo transdonos al ili antaŭe de sur la kruco kaj poste kiam Li resurektinta sin prezentos al la disĉiploj.

Temas pri la Spirito, nome pri la povo de la amo de Dio kiu estas komunikata al la homo kaj lin kapabligas sindone ami, kiel li sin sentas amata de Dio. Jen kial Jesuo diras: “Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti”.

Tio kio Dio estas, kaj ilia amo ne povas esti konataj se ne pere de laŭgrada kono kaj sperto ĉiam pli profundaj. Estas la ricevita amo kiu transformiĝas en komunikitan amon, tiu kiu permesas al ni plilarĝigi nian koron kaj al Dio transverŝi en ĝin sian amon.

Do, ju pli ni amas des pli ni sukcesas kompreni Jesuon, kiu estas videbla esprimo de Dio kiel nura amo. La disĉiploj ne ankoraŭ kapablas tion akcepti ĉar ili ne estas pretaj donaci sian propran vivon.

Tiam, povas kompreni la mesaĝon de Jesuo nur kiu, kiel Li, estas preta donaci sian vivon mem,

tio ne indikas nepre la ekstreman oferon de la krucumo, sed ĝi nur indikas tiun kiu direktas sian propran vivon enmetante en ĝin kiel unuuran absolutan valoron de la ekzistado la bonon de la homo - kiu vere ne estas prinegocebla - .

Kiu vivas tiamaniere, tiu permesas al Dio komuniki al li kiu estas Dio. Kaj Jesuo daŭrigas: “Kiam venos li, la Spirito de la vero”, la trian fojon tie oni nomas tiel tiun Spiriton, “li gvidos vin en ĉian veron**”.** Jam plurajn aliajn fojojn Jesuo sukcesis diri ke oni ne havas la veron, sed oni ĝi estas. La vero ne estas revelaciita doktrino sed ĝi estas vivmaniero.

Jen kial Jesuo jam diris ke oni faras la veron. Tiu ĉi distingo estas grava. Tiu kiu supozas posedi la veron ĝuste surbaze de tiu vero kiun li havas, kaj de sia propra doktrino li permesas al si juĝi la aliulojn, kaj tion lin disigas de la aliuloj.

Esti en la vero kaj fari la veron, male, signifas enŝovi sin en la dinamikecon de amo de la Spirito de Dio kiu direktas, kondukas la homon alporti ĉiujn siajn fortojn al la homa bono. Dum kiu posedas la veron disiĝas, apartiĝas disde la aliaj, kiu estas en la vero alproksimiĝas kaj sin metas je la servo de la aliuloj.

“Li gvidos vin en ĉian veron; ĉar li parolos ne de si mem; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos”, kaj jen la certigo pri la ĉeesto de la Spirito en la kristana komunumo, “kaj li anoncos al vi venontajn aferojn”. Kion tio signifas? Ne temas pri nova revelacio flanke de la Spirito, sed temas pri la renovigo de la mesaĝo laŭ novaj manieroj kaj formoj por la vivo de la komunumo.

Do, ne temas pri nova mesaĝo sed pri ĝia kompreno. La komunumo kreskas, evidentiĝas novaj bezonoj kaj novaj necesoj, kiel oni respondas al tiuj? Jen la ĉeesto de la Spirito kiu enmetas kiel nepran valoron la bonon de la homo, tiu kiu ne estas prinegocebla, la Spirito malkovrigas novajn respondojn al novaj bezonoj de la komunumo. Tiu ĉi estas la certigo pri la ĉeesto de la Spirito de Jesuo en Sia komunumo.

“Li gloros min, ĉar li ricevos el miaj**”,** tiaj kiuj apartenas al Jesuo estas la pleneco je la amo de la Patro, la Spirito, “Kaj li li ĝin anoncos al vi”. Ne estas doktrino kiun oni anoncas, sed ĝi estas Spirito, amenergio, kiun oni povas kompreni nur pere de agoj kiuj elmontras tiun amon.

Ju pli ni malfermiĝas al la amo por la aliuloj kaj ju pli ni permesas al Dio sin montri des pli ni kapablos Lin kompreni. Jen kial la religiaj aŭtoritatuloj ne konis kiu estas Jesuo, kaj ne konis kiu estas Dio, ĉar ili estis fermitaj al la amo; por ili la plej grava afero estis la bono de la doktrino kaj ne la homa bono.

Kaj Jesuo finas: “Ĉio ajn, kion la Patro havas, estas mia”, la pleneco de la Patro estas la pleneco de la amo esprimita de la Spirito kaj la Patro ĝin komunikis al la filo, “Tial mi diris, ke li ricevos el miaj kaj anoncos al vi”.

Jen Jesuo daŭrigas ree prezenti la saman mesaĝon: la anonco ne estas doktrino, sed ĝi estas amsperto. Kaj la tasko de la kristana komunumo ne estas tiom transdoni doktrinon, sed ĝi estas farigi spertojn je amo kaj je vivo al ĉiuj kredantoj.